Op 7 mei wordt Marjorie Boulton 90 jaar. In het Esperanto verschenen van haar onder andere een biografie van Zamenhof, enkele dichtbundels (Cent Ĝojkantoj, Eroj, Kontralte), toneelstukken (Nia Sango, Virino ĉe la Landlimo) en een lees- en leer-boek voor gevorderden (Faktoj kaj Fantazioj). Sommige daarvan zijn alleen nog tweedehands te vinden. Andere zijn te koop via www.retbutiko.net of <http://katalogo.uea.org>.

André Ruyschaert

Sinjorino Marjorie Boulton studis en la Universitato de Oksfordo, Britio, kie ŝi doktoriĝis pri literatura scienco. Nun profesia verkisto, ŝi dum multaj jaroj estis direktoro de pedagogia kolegio. Ŝi lernis Esperanton en 1949. Ŝiaj verkoj inkluzivas la poemaron Kontralte (1955), Kvarpieda kamarado (1956), Cent ĝojkantoj (1957), Virino ĉe la landlimo (1956). En 1960 ŝi publikigis la anglalingvan biografion Zamenhof, Creator of Esperanto, kies Esperanto-version Zamenhof aperis en 1962. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto. (El Faktoj kaj Fantazioj).



Satelitoj kaj kosmostacio

Ĵus ekfunkciis la Esperanta fasado de la populara astronomia retejo Heavens-Above.com. La aŭtoro de la esperanta traduko estas la ukraina esperantisto kaj amatora astronomo Pavel Moĵajev, kiu uzas la paĝaron precipe por trovi la situon de la artefaritaj satelitoj. En intervjuo de Libera Folio li rakontas, kial li entreprenis tiun taskon, kaj al kio la esperanta versio povas utili: 10-taga prognozoj

por aparte interesaj satelitoj, Internacia Kosmostacio (IKS, Nord-Korea satelito X-37B, kosmo-teleskopo Hublo, satelita datenbanko; kosmaj aparatoj kiuj forlasas la sunsistemojn, amatoraj radisatelitoj – ĉiuj traflugoj, stela mapo, mapo de la sunsistemo, konstelacioj, ktp... La tuta artikolo legeblas ĉe:

<http://www.liberafolio.org/2014/la-universo-nun-alireblas-en-esperanto>

La retejo estas tre interesa, la esperanta teksto tre bonkvalita, kaj la bildoj okullogaj. Pavel Moĵajev cetere estas multflanka homo: kirurgo en hospitalo, preleganto en universitato, muzikisto-gitaristo-kantisto, verkinto de Esperanta muzikdisko: Pluke-Traduke, kaj unu el la junaj membroj de la Akademio de Esperanto

Ret-info / Lingvo-Studio, L.S.



Ĉu Esperanto por abiturienta diplomo en Francio?

En 2011-2012 la francaj Esperanto-asocioj SAT-Amikaro kaj Espéranto-France kolektis pli ol 33.000 subskribojn por petskribo, ke Esperanto estu akceptita kiel nedeviga fako por la abiturienta diplomo.

En Francio fine de la mezlernejo, 18-jaruloj trapasas ekzamenon kun maksimume tri lingvaj fakoj, devigaj kaj

nedevegaj. Inter la nedevegaj estas elektebla sesdeko da lingvoj, kelkaj por parola ekzameno, sed la plimulto por skriba ekzameno. La francaj samideanoj petas, ke Esperanto estu akceptita por skriba ekzameno, t.e. teksto 30-linia en la fremda lingvo, pri kiu la kandidato respondu kvar demandojn. Ke li verku kelkajn liniojn de "persona es-

primo” kaj traduku al la franca dekon da linioj, entute dum du horoj. La nivelo estas inter B1 kaj B2.

La delegacion akceptis Isabelle Robin, oficejestro pri mezlernejoj, kiu mem ne rajtas decidi pri tia aldono de abiturienta fako, sed raportas pri la 70-minuta diskuto al la decidopova direktoro pri mezlerneja instruado (DGESCO) kaj al la konsilistoj de la ministro.

Isabelle Robin rakontis, ke kelkajn tagojn pli frue ŝi akceptis kurdan delegacion, kiu same petis, ke la kurda lingvo estu akceptita kiel nedeviga fako en abiturienta ekzameno. Ŝi memorigis, ke 98% de la lingvo-ekzamenoj koncernas kvar lingvojn; do ĉiuj aliaj estas “maloftaj lingvoj” (inkluzive, ekzemple, de la ĉina). Krome tia decido



estas tiel simpla, ĉar necesas, ke la Ĝenerala Inspektoraro (ministeria instanco, kiu fakte respondecas pri la instruado) komisiu respondeculojn pri la koncerna lingvo.

Dum la venontaj semajnoj ne atendeblas rapida reago de la decidantoj en la ministerio, unue ĉar ili estas okupataj pri la reformo decidita de la ministro Vincent Peillon, due ĉar la 2-an de aprilo 2014 ŝanĝiĝis la ministro (la nova nomiĝas Benoît Hamon). Tamen la delegacio daŭrigas la agadon, kontaktante homojn kaj en la Ĝenerala Inspektoraro, kaj ĉefe en la Supera Konsilio pri Programoj, ekstera konsilanta instanco, parte faka parte politika, kreita en 2013.

Ret-info / Lingvo-Studio, LS



Ricevu informojn per "PER esocom"

Multaj esperantistoj neglektas aŭ forlasas esperanto.com kaj ipernity.com kaj transiras al facebook.com, kaj tie perdiĝas en abundego da informoj. Kelkaj jam rezignis pri la eblecoj de la interreto. Dume en PER anoncetoj pri konkreta kunfarado atendas vian atenton. Eble ankaŭ vi ŝatas havi ĉiĉeronon en via vizitota urbo aŭ ekzemple publike ofertas vian pretecon esti ĉiĉerono por esperantistoj. Eble vi deziras uzi ne tiom da tempo por trarigardi la anoncetojn.

Por ricevi informojn el PER en digestebla kvanto mi proponas aboni novaĵojn: instalu en via retpoŝtprogramo konton kun la ligilo

<http://per.esocom.de/feed.xml> kaj vi ricevos de tempo al tempo ligilon al interesa ebleco kunfari. Se vi klakas al <http://per.esocom.de/feed.wml>, tio malfermas vian legilon kaj vi povos aboni tie. Povas tamen esti, ke vi vidos nur strangan kodon. Tiam via ligilo ne estas preparita por aboni, kaj vi bezonos aplikaĵon, kiu ebligas la abonadon

Krome mi petas povi plusendi mian informon al viaj konatoj, precipe al tiuj, kiuj ne partoprenas en interretaj sociaj retoj. Eĉ estas multaj esperantistoj, kiuj ne havas aliron al la tuttera teksaĵo, kaj povas nur sendi kaj ricevi retleterojn aŭ partopreni en

novaĵgrupoj. Pensu ankaŭ pri ili. Kaj nepre ne forgesu vian kursanojn kaj homojn, kiuj vin demandas kion fari per Esperanto.

Informu kiel eble plej multajn homojn pri mia maklerejo ne nur pri via temo. Ju pli PER estas konata, des pli granda estas la ŝanco, ke helpopetantoj ricevos helpon, ke muzikŝatantoj aĉetos vian kompaktdiskon kaj tiel plu.

Se vi havas demandon, ne hezitu skribi al mi. Se vi malŝatas amasleterojn, tiam mi petas vian indulgon. Salutas amike,

Frank Merla

info@per.esocom.de



La programo de AMO

Jen rapidaj ĝisdatigoj pri la progreso por la seminario pri AMO (Aktivula Maturigo) en 2014, precipe pri la dua kaj kaj tria.

AMO-1

Finiĝis konkurso pri la stipendioj. En la fino UEA decidis aljuĝi kvar stipendiojn po cent eŭroj al du junaj aktivuloj el Pollando (rekomenditaj de PEJ), unu el Ĉeĥio (slovako, rekomendita de E2I) kaj unu el Aŭstrio (rekomendita de tiea UEA-komisiito). Pliaj aliĝoj al JER kaj SPAM1 estas tre bonvenaj Vidu www.jer.hu.

AMO-2

Pluiras la planoj sandviĉi tiun seminarion inter NASK (<http://nask.esperantic.org>) kaj la Amerika Kongreso (<http://Esperanto-usa.org>).

Seminaria temo: Strategio kaj praktiko de Esperanto-informado en Norda-Ameriko, 9-10 julio 2014, Sidnejo (tuj

apud Viktorio sur la insulo Vankuvero), Brita Kolumbio, Kanado.

Tiu ĉi dutaga seminario estas grava paŝo al la plifortigo de la pozicio de Esperanto en Norda Ameriko. Ĝin gvidos UEA-prezidanto d-ro Mark Fettes, kun helpo de d-ro Humphrey Tonkin, antaŭa UEA-prezidanto, kaj d-ro Orlando Raola, prezidanto de Esperanto-USA, kun kontribuoj de aliaj aktivuloj.

Kosto: US\$ 40 (partopreno en la sesioj, materialoj, kafo, teo, akvo, manĝetaĵoj). Manĝoj kaj aliaj trinkaĵoj ne estas inkluzivitaj. Tripersonaj ĉambroj en la najbara Travelodge kostas CA\$ 120 por nokto. Depende de la aliĝoj, subvencioj haveblas por gejunuloj kaj aliaj. Detaloj, programo kaj aliĝilo por AMO-2 troveblas ĉe

<http://esperanto-usa.org/eo/content/uea-seminario-por-aktivula-maturigo-kanado>.

AMO-3

Ni ĝojas enmanigi al vi la skizan programon, kiun pretigis la surloka organiza teamo. La temaro estas vasta, sed kun relative longa seminario, eblos trakti multon en Siano, Ĉinio. La programo invitas kontribuantojn anonci sin kaj sian temon. Bonvolu ekagi!

AMO-4

Tio okazos kadre de la 81-a Nacia Kongreso de Esperanto en Italio (en montaro apud Trento). Informoj troveblas ĉe: <http://kongreso.esperanto.it>. La nuna verkanto

kunordigos la gvidantan teamon, kiun ni esperas starigi per fakuloj jam aliĝintaj (aŭ aliĝemaj) al la kongreso. Emuloj ĉiuokaze en la Kongreso bonvolu anonci vin al mi! Dankon!

Pli da AMO-j

Ni nun studas du proponojn por pliaj seminaroj, kiuj okazus malfrue en 2014, verŝajne en decembro. Informoj sekvos! Ekde julio ni komencos kunmeti la oferton por 2015.

Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA



Konkurso pri partopreno en terminologia kurso

Same kiel en 2012 UEA denove ebligas al studentoj konkursi pri partopreno en terminologia trejnkurso de la internacia terminologia reto TermNet. La unusemajna ne-esperantista kurso okazos de la 14-a ĝis la 18-a de julio en Vieno. Antaŭkonoj pri terminologio ne estas postulataj, sed jes interesiĝo pri terminologia administrado, ĉu el la vidpunkto de lingvistoj (ekz. tradukistoj), ĉu el tiu de aliaj fakuloj (ekz. inĝenieroj aŭ komputilistoj okupiĝantaj pri teknologio por komunikado, dokumentado, klasifikado de scioj ktp.).

Per la konkurso eblos gajni subvencion por povi partopreni en la kurso. Ĝi valoras ĉ. 100 eŭrojn kaj inkluzivas ĉambron en junulargastejo dum la kurso, unusemajnan biletan por la publika transporto, plenan studentan kursotizon (390 eŭroj) kaj vojaĝkostojn ĝis maksimume 500 eŭroj.

La subvencion gajnos du studentoj. Aliaj partoprenantoj povos gajni libropremiojn.

En la konkurso povas partopreni studentoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA aŭ TEJO kaj, krom Esperanto, regas labornivele la angla. Por partopreni necesas prepari sian vivresumon (maksimume du paĝoj A4) kaj prefere unupaĝan akompanan leteron, en kiu oni klarigu, kial oni volas lerni pri terminologio. Ankaŭ dokumentojn oni sendu ĝis la 31-an de marto 2014 al tec@co.uea.org. Pli da detaloj pri la aranĝo troviĝas en la retejo de la organizantoj: http://www.termnet.org/english/events/tss_2014/index.php. Raporto de partopreninto en 2012: http://esperanto.net/tec/itss_2012.pdf.



Jubileo ĉe Lingvo-Studio, 1984-2014

Ĝuste antaŭ 30 jaroj, fine de februaro 1984, estis fondita nia malgranda entrepreno Lingvo-Studio, kiu estis kaj estas la kerno de la nuna Budapeŝta Esperanto-Centro "Eventoĵ".

Ne multaj firmaoj ĝisvivis tiun aĝon, ĉefe ne en Esperantujo, do ni festas kun ĝojo tiun datrevenon! Dum la pasintaj 30 jaroj ni funkciis kiel Esperanta sonstudio, eldonejo, redakcio, ni organizis IJS-on, realigis plurajn rekordojn per la gazeto Eventoj, kaj plurajn aliajn kun nia

nuna Esperanto-Lingvolernejo.

Kelkaj el niaj fierigaj realigoj :

- Antaŭ la interreta epoko ni eldonis dum dek jaroj la novaĝgazeton Eventoj, kiu per sia dusemajna aperritmo estis tiam la plej ofta Esperanto-informilo. Ĝi havis abonantojn en pli ol 65 landoj. . .

- Eventoj estis la unua gazeto, kiu havis regionajn represajojn: la budapeŝta preseja originalo estis sendita per rapida poŝto al Pollando, Rusio kaj Litovio, kie

oni presis ka distribuis ĝin al enlandaj abonantoj – kun aldono de sia enlanda informilo. . .

- Eventoj estis la unua Esperantogazeto, kiu siatempe registris por si propran interretan domajnon: "eventoj.hu" kaj Eventoj estis la unua kiu publikigis senpage en interreto sian tutan arkivon! (Pli frue tio ne estis kutimo.)

- La vorton "Lingvo" ni registris por dek jaroj kiel leĝe protektata varmarko, kaj du niaj universitataj diplomverkoj (ambaŭ pri merka-

tiko) analizis la agadon de Lingvo-Studio.

- Ekde dekelkaj jaroj ni funkciigas Esperanto-lernejon en Budapeŝto, kiu estas verŝajne la plej granda en Esperantujo. Tri komplete instalitaj lernoĉambroj de 110 m², kie la esperantaj kursojn gvidas 5-8 instruistoj laŭ kontrakto... Lernis la lingvon ĉe ni (ĝis nun pli ol tri mil personoj. Mi nur bedaŭras iomete, ke pri tiuj sukcesoj oni ne trovas informojn en la revuo de ILEI.

- Laŭ mia scio nia instruila pakaĵo "Sukcese ĝis la E-ekzameno..." estas la plej ampleksa lernilo-kompleto en Esperantujo, konsistanta el pli ol 10 integraj eroj! Ni funkciigis tutlandan libroservon kaj ankaŭ senpagan instruistoperan servon, kiu proponas 96 privatajn Esperanto-instruistojn al dezirantoj dise en la lando.

- Ekde 2003 ni funkciigas propran, unikan, pagatan, (!) interretan kurson por hungaroj. NE TEMAS

pri la Lerno-kurso! Ni mem konstruis propran kursosistemon de nulo ĝis B2 (meza nivelo), sen financado fare de ESF aŭ de alia asocio... Ne estis simple atingi, ke pli ol 4000 homoj elektu nian pagatan kurson anstataŭ la senpagan Lerno...
- Estis kompreneble multaj aliaj interesaj projektoj. Pri la pasintaj 30 jaroj de Lingvo-Studio mi kompilis mallongan resumon, kie la fotojn akompanas klarigaj tekstoj. Ĝi estas trovebla ĉe la adreso <http://www.eventoj.hu/lingvo-studio-jubileo30.htm>. La albumo estas publika. Por rigardi ĝin vi ne devas esti membro kaj ne devas anticipi registriĝi, sed la plaĉon oni povas signi per la apuda butono. Por komenci la albumon, klaku sur la kandelan foton (kun la nombro 30). Dekstre estas legebla la klariga teksto. Se ĝi ne almetblas al la ekrano, klaku sur la surskribon "Daŭrige" (aŭ "Vidi pli"). Se vi

malgranda parto de nia agado. Alian duonon – kiel STEB, Kalendaron, reklamkampanjojn de Eo, filmojn, Ret-Infon, renkontiĝojn, FB, landan agadon, ktp – ni faras kiel voluntulan laboron en la kadro de la fondaĵo Eszperantó kaj nia loka E-asocio.

metas la muson super la bildon, dekstre kaj maldekstre aperas blankaj sagoj por salti al la sekva bildo.

La naskiĝtagrevena albumo montras nur eventojn ligitajn al Lingvo-Studio – sed ili estas nur

Antaŭ la interreta epoko ni eldonis dum dek jaroj la novaĵgazeton Eventoj, kiu per sia dusemajna aperritmo estis tiam la plej ofta Esperanto-informilo

László Szilvási, LS

★

Ekspozicio "Esperanto kaj kolektado" demandas pri viaj kolektoj

La 27-an de septembro 2014, kadre de la tutŝtata filatela ekspozicio, okazos ankaŭ la inaŭguro de la nova tutjara ekspozicio kun la supra temo en la Esperanto-Muzeo Svitavy en Ĉeĥio. Por ke ĝi estu laŭeble plej altkvalita kaj bunta, la organizantoj bonvenigas la kunlaboron de Esperanto-kolektantoj! Ni serĉas interesiĝantojn, kiuj pretus senpage disponigi por unu jaro elekton el siaj kolektoj. Bona praktikto kaj protekto kontraŭ damaĝo aŭ ŝtelo estos prizorgita. Nomoj (kaj laŭ interkonsento fotoportretoj) de la ekspoziciantoj estos vidoble menciitaj. ĈEA pretas repagi la sendokostojn de la pruntedonantoj kaj siakoste ankaŭ bonorde resendi la materialojn post la fino de la ekspozicio. Ni serĉas ekspoziciaĵojn en la sekvaj kategorioj:

1. "Esperantaĵoj" (prioritate filatelaĵoj): poŝtmarkoj kaj kovertoj, tridimensiaj objektoj (suveniroj kun Esperanto-motivoj, kuriozaĵoj), sed ankaŭ insignoj, glumarkoj, medaloj, kalendaroj ktp (ne tiom

bildkartoj, krom historiaj ĝis 1939).

2. "Kion kolektas esperantistoj": specimenoj el diversstemaj kolektaĵoj pri NEesperantaj temoj: ekz. moneroj kaj bankbiletoj, artaĵoj, popolmetiaj objektoj, folkoraj pupoj, ludiloj ĝenerale k.t.p.

3. "Kuriozaj suveniroj el eksterlando". Bonvolu sendi vian ĝeneralan oferton al la adreso muzeagrupo@esperanto.cz (kun priskribo kaj laŭeble fotoĵoj de la ekspoziciaĵoj). Nur post konkreta interkonsento bv. sendi la elektitajn objektojn. Alikaze ĈEA ne garantias kovron de la sendo-kostoj aŭ ekspoziciigon. Eblas kompreneble ankaŭ persona transdono en Svitavy (aŭ dum la Regiona Renkontiĝo en Litomyšl). Dankon pro via komprenemo. Ni antaŭdankas vin pro via intereso kaj antaŭĝojas pri nia kunlaboro!

Laŭ Retkomunikaĵo de ĈE

★

CLUBPROGRAMMA'S

Tenzij anders vermeld zijn alle vergaderingen gratis en voor iedereen toegankelijk. Let wel dat de meeste activiteiten in het Esperanto plaatsvinden. Uiteraard zijn we steeds bereid geïnteresseerde bezoekers in het Nederlands te woord te staan.

ANTWERPEN – groep Esperanto Antwerpen

Alle programma's hebben plaats in het Esperantohuis, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, in de clublokaal op de eerste verdieping. De clubavond begint om 20.00 uur. Iedereen is welkom.

Elke vrijdagavond is er een bijeenkomst. Het programma zal tijdig verschijnen op volgende webstek:

<http://esperanto-antwerpen.weebly.com/>.

majo 2 - Klaas Dijkstra:-3- dimensia printado

majo 9 - Agnes Paul Ivo:- 53, 50, 49

majo 16 - Eddy V. d. Bosch:- Bildoj pri la klubaj aktivecoj en 2013

majo 23 - Yves Nevelsteen:- Ideointerŝanĝo pri la estonto de FEL kaj la domo

majo 30 - Jakvo :- Vocxlega vespero

junio 6 - Ivo:- Komuna tradukado

junio 13 - An Olijslagers:- Komunikadhelpiloj por Locked-In homoj.

junio 20 - Martin Ptasiński:- La influo de la jida lingvo sur Esperanto

junio 27 - Debato pri milito, intersxtata paco, Europa Unio, streboj al sendependigxo en Europo.

BRUGGE – Paco kaj Justeco

Hou onze webstek www.esperanto-brugge.weebly.com in het oog voor de komende activiteiten, of vraag meer informatie via: heidi.goets@gmail.com.

BRUSSEL – Esperantista Brusela Grupo

www.esperantobruselo.org

Vergaderplaats: gebouw Van Maerlant, op de hoek van de gelijknamige straat en de Belliardstraat, tegenover het Leopoldpark, dicht bij het metrostation Maalbeek

Elke woensdag van 18.30 u tot 20 u

Aangezien dit gebouw tot de Europese Instellingen behoort, is er een vrij strenge controle. Bezoekers gelieven zich op voorhand aan te melden.

Contact: Françoise Pellegrin,

e-mail: fransuaz@esperantobruselo.org

Telefoon: 02 358 27 28

DILBEEK – Konversacia rondo en Esperanto.

Adreso de la kunvenoj: Kulturcentro "West-rand", Kamerrijcklaan (sen numero), 1755 Dilbeek

Ni kunvenos en salono 301 (3-a etaĝo), de la 14-a ĝis la 16-a horo.

Por pli da informoj: Lydia Buyst 054 33 01 51 aŭ

www.westrand.be

GENT – La Progreso

<http://www.esperanto.be/gent>

Iedere 4-de vrijdag van de maand is er een clubvergadering in ons lokaal "La Progreso", Peter Benoitlaan 117, 9050 Gent-Brugge. Aanvang: 20.00 u

Inlichtingen bij Katja Lödör, tel. 19-230 16 77 of 09-221 10 02

Zaterdag 31 mei: onze jaarlijkse zoektocht, ditmaal onder het motto "Gentse Koppen".

KALMTHOUT – La Erikejo

<http://users.telenet.be/La.Erikejo/Index.htm>

La kunvenoj de La Erikejo okazos kiel kutime en la Parochiecentrum de Heide, inter la 20 – 22aj horoj.

Donderdag 15 mei, jaarlijks uitstapje in een groene omgeving. Onder leiding van de plaatselijke boswachter, Marc Schuermans, wandelen we op het Groot Schietveld. Mogelijk zullen we de nachtzwaluw te zien krijgen zo

we voldoende laat ter plaatse blijven. Uur en plaats van afspraak zullen nog meegedeeld worden. Omdat Maria niet erbij kan zijn wordt in juli nog een picknick georganiseerd in het Ravenhof, beter toegankelijk voor haar.

Donderdag 19 juni, vertaal oefeningen en taalstudie. Helpe de diversaj ekzercoj ni plibonigos nian konon de Esperanto.

KORTRIJK – Koninklijke Esperantogroep La Konkordo

www.esperanto-kortrijk.info

Maandelijks bijeenkomst in Erfgoedhuis, zaal Lessius, 1-ste verdieping, O.L. Vrouwstraat 45, Kortrijk (tel. 056-27 74 24) elke vierde dinsdag van de maand van 19.30 u tot 21.30 u, niet tijdens juli en augustus. Indien de vierde dinsdag een feestdag is, dan op de derde dinsdag.

Contact via e-mail piet.glorieux@gmail.com en esperantokortrijk@hotmail.com.

Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet

Normaal zijn op elke eerste en derde donderdag van de maand vrijwilligers aanwezig in het Esperanto-Fonds Cesar Vanbiervliet te Kortrijk.

LEUVEN – Esperanto 3000

<http://www.esperanto.be/esperanto3000>

De bijeenkomsten hebben plaats in het Cultureel Centrum "Romaanse Poort", Brusselsestraat 63, 3000 Leuven, vanaf 19.30 u; de lezingen beginnen om 20.00 u.

Pri la programo neniŭ informo!

OOSTENDE – La Konko

Conversatienamiddag: iedere maandag van 14 tot 16 u – niet op 7, 14 en 21 april

Meer info: www.lakonko.be

of tel. 059-70 29 14

Lokaal: vroegere Albertschool, Ooststraat 29, Oostende

1) Conversatienamiddag op maandag 14u-16u (niet op 8/6)

2) Conversatieavond op woensdag 18u - 20u op 21/5 en 25/6

PEER – Limburga Esperanto-Asocio

Onze bijeenkomsten hebben plaats elke laatste donderdag van de maand van 20 u tot 22 u in het Cultuurcentrum "t'Poorthuis", Zuidvest 2, 3990 Peer, van september tot en met juni.

Alle Esperanto-sprekers zijn hartelijk welkom!

Meer info: pieter-jan.doumen@telenet.be

Ĵaŭdon, la 22.05.2014: Kantovespero. Sur sia gitaro Paul Hotterbeekx akompanos la esperantlingvan kantadon, kiun gvidas Pieter Jan Doumen, kaj ankaŭ sola kantos kelkajn numerojn.

Ĵaŭdon, la 19.06.2014 (escepte je la tria ĵaŭdo de la monato!). Paul Hotterbeekx gvidos promenadon tra la naturreverzejo "De Wulp" en Neerpelt. Kunveno ĉe Paul je la 20h00. Adreso: Hamonterweg 169 B, 3930 Hamont-Achel (en Achel je 100 m de la rotondo en la direkto de Hamont, maldekstre).

TIENEN – La Hirundo

<http://home.tiscali.be/la.hirundo/>

Info: Bert Boon, Merelhof 8, 3300 Tienen

Tel en fax: 016-81.52.46, bert.boon@skynet.be

Geen info ontvangen!

Esperanto Vlaanderen

Contactadressen in Vlaanderen

ANTWERPEN

Esperanto-Antwerpen, p/a Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen,
tel. 03 234 34 00, esperanto-antwerpen@esperanto.be
La Verda Stelo: jakvoschram@telenet.be

BRUGGE

Paco kaj justeco, Heidi Goes, Assebroeklaan 2, 8310 Brugge,
tel. (0)50 67 51 78, heidi.goes@gmail.com

BRUSSEL

Françoise Pellegrin, Eiklaan 14, 1640 St-Genesius-Rode,
fransuaz@esperantobruselo.org, +32 2 358 27 28

Laurent Loisse, Tir-aux-Pigeons 95 1150 Bruxelles,
tel. 02 770 11 71, sekretario@esperantobruselo.org

GENT

La Progreso Katja Lödör, Peter Benoîtlaan 117, 9050 Gentbrugge,
tel. 09 230 16 77, gent@esperanto.be

KALMTHOUT

La Erikejo, Mireille Smet-Storms, Dogulaslaan 14,
2950 Kapellen, tel.: 03 666 83 19, mireillestorms@hotmail.com

KORTRIJK

La Konkordo P. Glorieux, Pastoor Blanckestraat 8 bus 0201,
8610 Kortemark, tel.: 051 62 39 28, piet.glorieux@gmail.com,
Jean-Pierre Allewaert, Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk,
tel. 056 20 07 96, esperantokortrijk@hotmail.com

LEUVEN

Esperanto 3000 Roger Goris, Rue Ménadastraat 44,
1320 Hamme-Mille, tel. 010 86 01 12, goris.r@skynet.be

LIMBURG

Limburgse Esperantovereniging
H. Schutters, Panhovenstraat 10, 3930 Peer,
tel. 011 63 55 92, henri.schutters@skynet.be

LONDERZEEL

Frederik Vanden Brande, Hof ter Winkelen, Holle Eikstraat 25,
1840 Londerzeel, tel. 052 30 01 66, comite.jean.pain@skynet.be

OOSTENDE

La Konko Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel. 0486 36 23 65 (gsm), marc.cuffez@telenet.be

ROESELARE / TIELT ZIE KORTRIJK

TIENEN

La Hirundo <<http://www.lahirundo.be>> Info: Bert Boon,
Merelhof 8, 3300 Tienen, tel. en fax: 016 / 81 52 46, post@lahirundo.be

TURNHOUT

Maria Dom, Tuinbouwstraat 14, 2300 Turnhout,
tel. 014 41 72 92, de.groot-dom@telenet.be

Contactadressen in Nederland

<http://www.esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php>

ALKMAAR

Marijke Lathouwers, Kruiszwijn 1205 NL-1788 LE Den Helder
tel. +31(0)223-64378, esperanto.alkmaar@gmail.com

EINDHOVEN

Jeannette Bosse Veld, Montgomerylaan 361 NL-5612 BH Eindhoven,
tel. +31(0)402 113 344, jeannette.bosse@tiscali.nl

FRIESLAND

Frisa Esperantista Rondo, Wiebren Akkerman, Westerein 14a
NL-8571 GB Harich, tel. +31(0)514 602 272, wiebrenakkerman@hetnet.nl

GRONINGEN & DRENTE

Nelly Kiel-Klunder, G. Sterringastraat 60 NL-9728 VV Groningen,
tel. +31(0)505 251 436, nrkielklunder@hotmail.com

HAARLEM

Corrie Kwantes, Marnixstraat 57 NL-2023 RB Haarlem,
tel. +31(0)235 276 561

HELMOND

Toine Gremmen, Nassaustraat 3 NL-5707 HL Helmond,
tel. +31(0)492 544 472, info@twangremmen.nl

NIJMEGEN

Klubo "Zamenhof", Jan Bemelmans, Zwanenveld 2287
NL-6538 PS Nijmegen, tel. +31(0)243 882 926

ROTTERDAM

Esperantoclub "Mercurio", Atie van Zeist, Park Vossendijk 331
NL-3192 XG Hoogvliet, tel. +31(0)104 161 449

Andere nuttige adressen

Vlaamse Esperantobond / Flandra EsperantoLigo Frankrijklei, 140,
B-2000 Antwerpen, tel. 03 234 34 00, fax: 03 233 54 33
info@fel.esperanto.be, www.esperanto.be

Vlaamse Esperanto Jongeren Vereniging / Flandra Esperanto Junulara Asocio p/a Frankrijklei 140, B2000 Antwerpen. Tel.: 03 234 34 00
fleja@esperanto.be

ILEI-Belgio: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel.: 0486 36 23 65, marc.cuffez@telenet.be

Esperanto Scoutsvereniging/Skolta EsperantoLigo (SEL)

Stein Hautekees, Rue des Rêches 20, B-5530 Yvoir,
post#sel-belgio.be, www.sel-belgio.be

Association pour l'Esperanto, p/a Marcel Delforge, rue des Glacières 16,
B6001 Charleroi (Marcinelle), tel. + fax: 071 43 14 13
mardelforge@brutele.be

Belga Esperanto Fervojista Asocio (Sporwegesperantisten), Lucien De Sutter, Stockholmstraat 49 bus 2, 8400 Oostende, tel. 059 50 18 25

Esperanto Nederland, secretaris, p/a Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen, tel. 050-5718842, sekretario@esperanto-nederland.nl

Hoofdkantoor van de Esperanto WereldVereniging/Centra Oficejo de UEA
Nieuwe Binnenweg 176, NL3015 BJ Rotterdam,
tel.: 00 31 10 436 10 44, uea@inter.nl.net

Bestuursleden van FEL

Voorzitter: Jo Haazen

ondervoorzitter ; André Staes

secretariaat: Marc Cuffez, Elisabethlaan 295, 8400 Oostende,
tel 0486 362365, marc.cuffez@telenet.be


Peningmeester: Bart Demeyere

Bestuurslid: Eddy Van den Bosch

Trevor Steele

Konvinka kamuflaĵo

Trevor Steele



Ekde la apero de “Sed nur fragmento” ĝis la publikigo de “Paradizo ŝtelita” Trevor Steele estas unu el la plej produktemaj aŭtoroj en Esperanto. Pluraj el liaj verkoj fontas el liaj aŭstraliaj radikoj: “Sed nur fragmento”, la novelaroj “Memori kaj forgesi” kaj “Australia felix”, kaj la romanserio kun la titolo “La fotoalbumo”, kaj liaj lastaj historiaj romanoj “Flugi kun kakatuoj” kaj “Paradizo ŝtelita”. Sed aliaj verkoj rezultis el kontakto kun aliaj landoj, ekzemple Germanio, la fono de “Neniu ajn papilio” kaj “Kvazaŭ ĉio dependus de mi”; kaj Sove-tunio kaj aliaj regionoj el la vojaĝrakontaro “Falantaj muroj”, kaj precipe Hindio en “Diverskolore”.

Tiu ĉi aŭtobiografio prezentas serion da bildoj el la vivo de la aŭtoro kaj donas la fonon de lia verkado.

Eldonjaro: 2014

Tradicia bindita versio, formato 135 x 205 mm, 272 paĝoj. ISBN: 978-90-77066-50-8;

prezo ĉe FEL: 19 eŭroj + afranko. Kiel bitlibro (ePub, Mobi aŭ PDF)

prezo ĉe FEL: 11,50 eŭroj.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net.